


Amsterdama Kunlabora Komitato Esperantista



MONATA GAZETO

DE LA AMSTERDAMA ESPERANTISTARO

5a jaro, n-ro 8

REDAKCIAJ ADRESOJ

aŭgusto 1971

G.Roelofs, Ger.Callenburgstraat 4, West, tel. 187643

W.Zeiss, Anna Bijnstraat 2, West, tel. 139006

Adresŝanĝigojn al S-ro B.Groeneveld, Jan Springerhof 26, tel. 138233

DISTRA VESPERO de EERN, je ĵaŭdo, la 26a de aŭgusto en la Centra Stacidomo.

La Fervojista Rondo Nederlando havos jubilean jaron. Ĝi nome ekzistas 25 jarojn. Tiucele F.E.R.N. kunvenos je ĵaŭdo, la 26a de aŭgusto en Utrecht, kie okazos kongreseto kaj jarkunveno kaj por kiu oni invitis ankaŭ kelkajn eksterlandajn fervojistojn el la estraro de I.F.E.F., la Internacia Federacio de Esperantistaj Fervojistoj.

Tiu kunveno en Utrecht okazos dumtage, sed vespere la partoprenontoj estas invititaj por veni al Amsterdamo kaj festi en la rondo de la amsterdamaj fervojistoj distran vesperon. Nia amiko de Jong kun la estraro de la 4a sekcio kompilas programeton, kiu verŝajne enhavos kvizon, komunan kantadon, prezentadon de esperanto filmo, muzikon kaj kelkan tempon por gratul-paroladetoj.

Al ĉi tiu kunveno ĉiuj interesigantoj estas bonvenaj. Tre verŝajne kelkaj estraranoj de U.A.S.E., de la Asocio de Lab.Esp.kaj la amsterdamaj sekcioj de F.L.E. ricevos ankoraŭ aparte stencilitan invitilon por ĉi tiu kunveno.

El la nomo de F.E.R.N. ni do, ankaŭ per ĉi tiu A.K.K.E.-gazeto, kore invitas niajn legantojn por ĉeesti la senduba agrablan kunvenon je ĵaŭdovespero, la 26a de aŭgusto en la nova kunvenejo de la C.S. (Iri al la unua perono, sekvi ĝin en la direkton de la nova poŝtoŝeĵo, enirejo en la konstruaĵo ĉe la fino de la perono. Sur la pordo troviĝas la surskribo "Ontspanningslokaal A.S.S.V.". Per lifto vi povas atingi la 3a etaĝo).

Ĝis baldaŭ !

DIVERSAĴOJ.

Dum ni pretigas ĉi tiun A.K.K.E.-gazeton, pluraj membroj ankoraŭ ferias, troviĝas eksterlande aŭ enlande, sed momente ne okupas sin pri organizaj aferoj. Pro tio ne troviĝas la bezono verki apartajn Zamenhofan Gazeton kaj "Inter Ni". Tial ni limigos nin al la menciado de diversaj sciigoj kiujn ni intertempe ricevis kaj kiuj ankaŭ por vi povas havi certan valoron.

SEKCIO 5a.

Mardon, la 24an de aŭgusto ni denove kunvenos post la ferio ĉe la fam. ten Hagen, Nepveustraet 33

Mardon, la 31an de aŭg., konv.kunveno ĉe K-ino A.de Jong, Guus Trestorffstr.40.

" , la 7an de sept. " " " K-do A.W.P.Hilgers, El.Vlieropstr.12.

" , la 14an de " " " " K-ino G.v.d. Maagdenberg, H.v.Koningsbergenstr. 228

" , la 21an de " " " " fam.Keuning, Antoon Keldermanstr.19.

(Sangoj restas rezervitaj ĉar ni ne povis atingi ĉiujn membrojn).

HANS BAKKER (PATRO), 75 jara.

Tro malfrue por aperigi en la antaŭa A.K.K.E.-gazeto, ni eksciis ke la 16an de junio Hans Bakker memoris sian 75an naskiĝtagon. Samtempe kaj por ni plej grave: pli ol 40 jarojn li aktivis por Esperanto. Multaj el ni memoras lian Esperanto-Instituton, Rokin, Amsterdamo, eble jam en 1930.

Li kreis Esperanton en skatolo por kvazaŭ lude lerni Esperanton. Li verkis Esperanto lernolibron, iniciatis ĉe multaj stacidomoj en Nederlando ŝildojn de Esp.representanto.

Li iniciatis en publikaj telefonĉeloj Esp.-tekston pri manipulado de la telefono. Li ebligis ricevi en trajnrestoracioj menuon en Esperanto, same en pluraj hoteloj kaj restoracioj en Nederlando.

Li iniciatis karuselvojaĝojn por esperantistoj, estis aŭtoro de bildprospekto por Esperanto kaj leĝa tradukinto ĉe la A'dama juĝejo.

Tiom da laboro meritas honoron! Ni respekte gratulas lin.

SEMAJNFINO JE LA 18a KAJ 19a DE SEPTEMBRO 1971a.

Kun granda plezuro la N.H. distrikt-estraro de F.L.E. povas komuniki, ke ĝi sukcesis denove aranĝi semajnfinojn en la naturamika domo "De Banjaert" en Wijk aan Zee. Ĝi okazos la 18an kaj 19an de septembro 1971a.

Vi jam nun povas anonci vin ĉe la kasistino de la distrikto: K-ino A.Kwantes, Marnixstr.57, Haarlem. Tel:023-265417.

La kostoj por la tuta semajnfino estas denove f 11,-. La N.I.V.O.N.-membroj ĝuas rabaton. La ĝirkonto de la kasistino estas : 116430, Distr. Noord-Holland, Marnixstr.57, Haarlem.

Por atingi Wijk aan Zee vi prenu la vagonaron al Beverwijk kaj tie antaŭ la stacidomo la aŭtobuson al Wijk aan Zee.

GERIATRIO.

Dum kelkaj monatoj nia amiko Faulhaber troviĝas en Zonnestraal (Vos/Heyermans paviljono) en Hilversum, tamen ankoraŭ li restas aktiva esperantisto. Jam kelkfoje montriĝis ke li pere de Esperanto kapablis klarigi al eksterlandaj vizitantoj la labor-metodojn de la kuracistoj kaj geflegistoj.

Tiel ekestis la ideo, traduki kelkajn prelegojn koncerne ĉi tiujn resanigmanierojn kaj flegadon. K-do Faulhaber tuj estis preta - kaj fervora kiel li estas plenumi tiun taskon. Li ekhavis la tutan kunlaboron de la direktoro Prof.Schreuder, la kuracistino D-ino Diatlowicki-Tobi kaj de la gastigistino F-ino van Herten. La asocia estraro de F.L.E. decidis aldoni ĉi tiujn tradukojn de la prelegoj en libroformo.

La pretigita libreto kostas f 2,50 plus f 0,30 sendkostoj kaj oni povas mendi ĝin ĉe la Libro Servo de F.L.E., Marnixstr. 57, Haarlem.Tel.023-265417.

"ESPERANTO PANORAMO"KAJ"KONCIZE".

En unu koverto ni ricevis du gazetojn. Ili estas "Esperanto-Panoramo", dumonata gazeto eldonita de la Belga Esperanto-Federacio, dum la alia "Koncize" estas komuna eldonaĵo dumonata de la belga, germana, itala, franca kaj nederlanda esp.junularaj organizoj.

Ambaŭ gazetetoj estas bonaspektaj en praktika formato sed kun tre granda literotipo.

Krom informoj pri la belga esp. movado ni informiĝis pere de "Esperanto-Panoramo", ke depost la 1a de julio 1971, la korespondkurso "Esperanto Programita" nun ankaŭ aperos en la nederlanda lingvo. La kursgvidanto por la nederlandlingva regiono sekvas la saman metodon kiel Behrmann faris, t.e. ke li serĉas volontulojn por "testi" la kurson.

Interesiĝantoj turnu sin al: "Esperanto Programita", Drakenhoflaan 97, 2100 Deurne, Belgio.

En la sama numero (2e jaargang, nr.4) ni legas la jenon:

Op initiatief van het "Verband Deutscher Esperanto Lehrer" werd in de loop van de vorige maanden in de Duitse Bondsrepubliek een grootscheepse opiniepeiling gehouden. (En la pasinta A.K.K.E.-gazeto ni skribis pri ĝi).

De 60000 antwoorden die binnenkwamen werden aan een computer meegedeeld, die er de volgende besluiten uittrok:

- 59% van de Duitsers weet wat Esperanto is. Hiervan wisten bijna allen dat Esperanto over de gehele wereld verspreid is, maar bijna niemand dat het bijna tienmaal vlugger geleerd kan worden dan Engels!
- 89% geloofden dat de invoering van een tweede taal voor ieder het wereldtalen probleem uit de weg zou ruimen.

-77% waren voorstander van de invoering van het Esperanto in de scholen.
-18% geloofden in de zege van het Engels (voornl. leraren Engels), het Frans of het Duits.

Het "Verband Deutscher Esperanto-Lehrer" is van plan nog 100 000 mensen te ondervragen om de opiniepeiling nog juister te maken.

Ook in België heeft een dergelijke peiling plaats gehad (op initiatief van de Brugse Esp.groep). Op het ogenblik worden echter in Nederland ook formulieren gedrukt, die het mogelijk zullen maken dezelfde opiniepeiling in het Nederlandse taalgebied op grote schaal te voeren.

EL "KONCIZE" NI TRANSPRENAS KELKAJN INFORMOJN.

15a Internacia Seminario.

"Ĉu vi volas por unu semajno pli intense lerni, praktiki, amuziĝi (do VIVI?).

Se jes, nepre venu al Hamburgo la 27an de decembro 1971. Okazos tie la 15a Internacia Seminario de Germ.Esp.Junularo sub ĝenerala temo: "Homo kaj Tekniko".

Datoj: 27 decembro 1971 - 3 januaro 1972; loko Hamburgo.

Por ĉiuj informoj turnu vin al la sekretariino de G.E.J.:

Ingrid Maier, D-69 Heidelberg, Hauptstrasse 246, Fed.Resp.Germanujo.

UDO JÜRGENS: "MI DEZIRAS AL ESPERANTO MULTE DA SUKCESO".

(El anonco) Udo Jürgens ne nur deziras al Esperanto sukceson, li kantos en Esperanto. La Esperanto-kantoj baldaŭ estos aŭdeblaj sur disko. Mendu jam nun la diskojn ĉe: Ludwig Pickel, Libro servo. Postfach 2113, D-85, Nürnberg 2.

SEMAJNFINO DE N.E.J.

Okazos la 2an kaj 3an de oktobro en la konferencejo "Spaarnberg", Santpoort apud Haarlem. Tiu ĉi semajnfino estos la unua naciskala daŭrigo de la Seminario "Lingvo kaj kulturo". En la venontaj semajnoj membroj de N.E.J. kaj najbaraj TEJO-sekcioj estos abunde informataj pri tiu ĉi renkontiĝo - la unua de N.E.J. kiu ne okazos en junulargastejo sed en komforta kaj moderna konferencejo.

ADRESO DE ESPERANTO-PANORAMO:

Drakenhoflaan 97, B-2100, Deurne - Antwerpen. Oplage 1200 ex.
Jaarabonnement *f* 1,50.

AŬTUNAJ FERIAJ KURSOJ.

Se vi havas feriotempon somere, arangu ĝin tiel, ke vi povos partopreni la aŭtunajn kursojn 17-23 de oktobro 1971 en la altlernejo "Junaj Hejmoj" ĉe Arhus, bela regiono ĉe maro kaj arbaro. La altlernejo havas preskaŭ luksajn cirkonstancojn.

Petu prospekton de L.Friis, Ingemannsvej 9, DK-8230, Åbyhøj, Danlando.

VINTRA ESPERANTISTA FERIO.

De la 28a de decembro 1971 ĝis la 2a de januaro 1972 okazos vintra Esperantista Ferio en la Hungara ĉefurbo Budapest. La programo antaŭvidas interalie: interkonanvesperon en originala hungara ĉardo, viziton en Hungara Ŝtata Operejo, tutagan ekskurson per Pionirfervojo kaj Fadenfervojo, vizitojn ĉe lokaj Esp.grupoj kaj silvestran balon.

Petu informojn ĉe: 1a Teritoria (Budapest.) Komitato de Hungara Esperanto Asocio, Budapest 70, Posta fick 153, Hungario.

ESPERANTISTA AKTIVECO EN HUNGARIO.

Por 1972 la hungara esp.movado organizos ne malpli ol tri gravaj aranĝoj. Car la U.E.A.-kongreso okazos en Ameriko kaj vizito al tiu lando por multaj estos tro granda elspezo, la U.E.A.-estraro decidis ankaŭ en Eŭropo okazigi Internacian Kunvenon.

Sub la aŭspicio de U.E.A., la Hungara Esp.movado tial organizos "Hungara Kultur-Festivalo", kiu okazos de la 17 - 23 de julio 1972 en Budapeŝto.

La ceteraj aranĝoj "La 10a jubilea sesio de Somera Esperanto Universitato" okazos en Gyula, de la 10 - 16 julio 1972 kaj la 5a internacia renkontiĝo de Esp.-Naturamiko (J.R.E.N.) okazos en Abaliget de la 24 julio ĝis la 2a de aŭgusto 1972. Ĉiuj ĉi aranĝoj do estas sinsekve viziteblaj kaj se vi havos okazon fari tion, vi povas esti certa pri tre varia kaj sukcesplena ferio.

Ĉiuj tri aranĝaĵoj laŭ administrado estas memstaraj, do oni devas aliĝi aparte al ili, laŭ la adresoj en Budapeŝto, Gyula kaj Abaliget.

PRI SOMERAJ ESPERANTO-UNIVERSITATOJ.

Dum la adiaŭa kunveno de la 9a Somera Esperanto Universitato en Gyula, mi laŭtlegis jenan poemon:

LA VERA HOMA RONDO.

Al Gyula jam la trian fojon venis
Kaj sentis ni l'apart-hungaran sferon.
Sed same sentis ĝojon kaj fieron
Ke nin nenia lingvo-baro ĝenis.

Per Esperantoĉion ja komprenis.
Feliĉe tial, ankaŭ ĉi someron
En rond' pasigis, kiu la aferon
De Esperanto kiel taskon prenis.

Dank al l'Somera Universitato
Ni ĝuis distron, kleron, interkompreniĝon
Al ĝi ni senrezerve kaj kun ŝato

Deziras kore, daŭran kreskon kaj famiĝon
Ekzemple restu S.E.U.en la mondo
Kaj pruvo jam pri vera homa rondo.

S-ro Bormann, la prezidanto de la germana Esp.-movado kaj unu el la prelegintoj dum la Universitata semajno, en siaj adiaŭaj vortoj esprimis sian admiron por la aranĝoj de S.E.U.. Lia opinio S.E.U. estos bonega kaj modelo imitinda por aliaj landoj. Anstataŭ unu aŭ du de tiaj someraj universitatoj, tuta reto de tiaj universitatoj devas troviĝi en la tuta mondo.

Ĝuste per tiuj universitatoj ni povas pruvi la grandan valoron de Esperanto, ne nur kiel rimedo por turismo - tiun unuflankan bildon ni nepre klopodu forigi - sed por ĉiuj terenoj de scienco kaj kulturo.

Per ĉi tiuj vortoj D-ro Bormann precize esprimis kion mi jam delonge pripensis. Precipe urĝa kaj pripensinda fariĝas la afero en okazo ke la venonta Televida kurso sukcesos. Ĉiel ni klopodu doni al la lernintoj la okazon por praktiki sian scion pri Esperanto kaj unue el tiuj rimedoj - flanke de la jam ekzistantaj internaciaj kongresoj, someraj kursoj k.t.p. - estos la eblo partopreni al tia Somera Universitato.

Ni estas konvinkitaj ke estas eble ankaŭ en Nederlando aranĝi tian someran universitaton kaj tiucele mi pensas al kunlaboro kun unu el niaj popolaj altlernejoj, kie jam regule okazas diversspecaj konferencoj : En Bergen (N.H.) troviĝas ekzemple tre plaĉa konferencejo kaj ŝajnas al mi realigebla tia somera universitato, se ni bone antaŭpreparas ĉion.

Temoj ni ne bezonas serĉi kaj certe troviĝas en nia lando sufiĉe da kompetentaj parolantoj. Abundas la aspektoj de la nederlanda kulturo: nia batalo kontraŭ la akvo; nia batalo por libereco; nia pentroarto; elstaraj nederlandanoj k.t.p.k.t.p. Krome ni ankaŭ povas inviti eksterlandanojn. Da okazoj por fari ekskursojn same abundas. Ili ĝenerale okazos posttagmeze kaj ankaŭ tuttaga ekskurso eblas. Krom Marken kaj Volendam ni povas fari ekskursojn al diversaj urboj, kasteloj, mueliloj, boatekskursoj k.t.p. En venonta A.K.E.-kunveno ni nepre prikonsideru la ĉi supran eblon. La proverbo pri la volo kaj la vojo ja estas sufiĉe konata .

Sincere salutas G.R.